# *Postulas sirianoj koni la restadejon de malaperintoj*




Havano, dec 28 (RHK) Centoj da sirianoj organizis sidkunvenon hodia? en la ?efurbo, Damasko, por ripeti sian postulon scii la restadejon de siaj parencoj kaj amatoj, malaperintaj dum la milito ekde 2011.

La partoprenantoj tenis fotojn de siaj parencoj, krom porti standardojn kun frazoj kiel "Mi ne volas nekonatan tombon por mia filo, mi volas la veron" kaj "malka?i la sorton de la malaperantoj estas rajto".

Dum multaj jaroj, ni kundividas la doloron de perdo kaj la necertecon de atendado de niaj parencoj, Wafa Mustafa diris al la gazetaro, nome de la partoprenantoj.

Li klarigis, ke kvankam pluraj arestitoj estis liberigitaj el malliberejoj, ilia nombro estas ankora? malgranda kompare kun la nombro de arestitaj kaj forrabitaj ekde 2011, kiu estas taksita je pli ol 100 mil homoj.

Same, entoj petis en deklaroj publikigitaj en sociaj retoj koni la sorton de miloj da soldatoj malaperintaj en la dezerto inter Deir Ezzor kaj Palmyra, anta? la falo de la registaro de Bashar Al-Assad.

Ili certigis, ke la afero de la malaperantoj estas ka?zo por ?iuj sirianoj, ?ar ?i tiu tipo de krimo estis farita de ?iuj flankoj kaj ne nur de unu.

La demando pri la sorto de dekoj da miloj da arestitoj kaj malaperintaj personoj estas unu el la aferoj esencaj por multaj sirianoj. La? la Siria Reto por Homaj Rajtoj, la nombro da arestitoj kaj malvolaj malaperoj en Sirio atingis 112 414 post malplenigo de la malliberejoj.

Fonto: PL

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/373010-postulas-sirianoj-koni-la-restadejon-de-malaperintoj](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/373010-postulas-sirianoj-koni-la-restadejon-de-malaperintoj)

**Radio Habana Cuba**